Viadagio

# Arta projekto por pli bona mondo

*Viadagio aspc estas asocio kiu dediĉas sin al daŭrigebla, konscia, estetika, poezia, respektema, harmonia kaj kvalitplena maniero de kunvivado.*

*Viadagio kontemplas la situacion de la medio kaj de la mondo, nian propran vivstilon kaj serĉas kiel ni povas kvalitplene vivi alimaniere.*

*Viadagio konkrete donas formon al ĝiaj idealoj pere de boatekskursoj sur la enurbaj akvovojoj en Gent (Belgio) en aŭtentaj lignaj boatoj, forpuŝitaj per muskola forto.*

La moderna vivo proponas multe da teknikajn eblecojn, sed havas ankaŭ negativan efikon al kiu ni ĉiuj estas alfrontitaj.

Unuflanke ni havas la materiajn mankojn de nia nuna vivstilo, kiel altiĝantaj energioprezoj, longaj viciĝoj, kolektivaj maldungoj, malriĉeco, fumnebulaj tagoj, oceanoj kun tro da plastaj restaĵoj, kreskantaj krokusoj en januaro. Tiu ĉi vivstilo hipotekas cetere la vivon de la estontaj generacioj, ni pensu nur al la elĉerpiĝo de krudmaterialoj aŭ profunda difektiĝo de la medio.

Aliflanke ni havas la mensajn mankojn kiel alta laborpremo, streĉiteco, deprimo, soleco, perforto, maltoleremo. Tio ĉi estas nur kelkaj ekzemploj de mondo en kiu ĉio devas iri pli rapide kaj pli efike, kie la produktado ofte triumfas koste de la vivkvalito, la medio kaj la estontaj generacioj.

© Viadagio v.z.w., Oudburg 38, BE- 9000 Gent



*Unika etoso surakva*

## *Elvokaj paroloj*

***hieraŭ mi vivis en fabelo…***

***la tempo iom haltadis,***

***la melodio de la piano***

***tiom sorĉanta,***

***la milda sono de akvo,***

***spontana aplaŭdo,***

***la noktolumo***

***reflektita sur la akvo…***

***senspiriga !***

*- Els -*

# Amatillo

Se ni iom haltas kaj meditadi kiom rapide ni mem vivas, kiel ni foje ekstreme ekcitiĝas, kiom ni tre fremdiĝis de la naturo, kiom malmulte ni atendas pri agrabla vorto, kiom amlofte ni surpriziĝas pri io malgranda kaj kiom malmulte da tempo ni prenas por kune ĝui la belecon de arto kaj naturo. Vivo en kiu preskaŭ ne estas tempo por la `nuna' momento kaj por konscie rilati kun la propra 'mio'.

### Ĉu forlasi nian revon ?

Konkretigante niajn idealojn, nia konvinkiĝo kreskas. Simbola ago povas rezulti en io per kiu ni kaj aliaj homoj povas sperti kiel io eblas alimaniere, ĉar la forto de spertoj estas pli forta ol la forto de vortoj.

Akvo havas ofte grandan influon sur homoj. Gent ne hazarde troviĝas je la kunfluo de la riveroj Leie [leje] kaj Schelde [sĥelde]. Akvo alportas iom da naturon en urba kunteksto. Riveroj havas ekonomian funkcion, en pli fruaj tagoj por akiri komercajn varojn, nuntempe precipe kiel turista alogaĵo.

La lignaj boatoj, kiuj estis faritaj en Bangladeŝo, estas forpuŝataj per muskola forto kaj sekve ne elĵetos $CO^2$ aŭ kaŭzas akvo-, son- aŭ aerpoluadon. La boatoj estis fabrikitaj laŭ la principoj de 'justa komerco', kun atento al rearbarigo kaj sen infanlaboro. Ili estas modelo de daŭrigebla turismo.

Boata ekskurso por vizitantoj devas esti momento dum kiu ili spertas la belecon de naturo kaj kulturo kaj propramaniere ekkonatiĝas kun la milda moviĝeblo. Akompanata de trejnitaj remistoj kaj ĉiĉerono ili malkovros la riĉan historion de Gent kaj konscios pri la pasinteco. Ili povos iom ripozi, eksurpriziĝi, aŭskulti la silenton kaj senti la harmonion dum komuna ekskurso. Depost 2008 asocioj, lernejoj, familioj,... povas peti boatan ekskurson.







**VIADAGIO** : www.viadagio.be
Oudburg 38, BE- 9000 Gent (Belgio)
T. : +32.9.225 07 86
E. : Ipman@belgacom.net